

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 40. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Octobro, 1923.

THE NURNBERG CONGRESS.

Another successful international Esperanto Congress has taken place. In spite of the state of unrest existing in Germany, more than 4000 Congress cards were issued to visitors from 43 countries. The Congress was held in Nurnberg during the first week of August. Professor Dr. Dietterle was elected President, and among the vice-presidents was S-ro. W. J. Drummond, the delegate from the Melbourne Esperanto Club. The President of the German Republic was directly represented at the Congress by State-Secretary Schulz; and Dr. Luppe, Lord Mayor of Nurnberg, took an active part in the opening, as he delivered an address of welcome in Esperanto, and, incidentally, showed that he had a good knowledge of the Esperanto movement, and was sympathetic to our aims.

After the formal opening, the first business was the reception of the report of the Lingva Komitato, and the report concerning the Akademijaj Konkursoj kaj Premioj. This announced that of the 32 competing works, six were elected for commendation, two of which—"Idoj de Orfeo" (de Bulthuis), and "Hermano kaj Doroteo" (traduko de Wuster)—were adjudged the best books of the year.

There was quite a competition to be selected as the meeting-place of next year's Congress, Vienna, Brussels, Sofia, and Milan each having advo-

cates. On being put to the vote, Sofia received 248 supporters and Vienna 215. The final decision, however, will be made by the Centra Komitato.

On the social side there was a banquet, attended by 700 Esperantists, a presentation of the German opera, "Die Meistersinger" ("The Master-singer"), a variety show at the Literatura Mondo Cabaret, a madrigal concert, an instrumental concert, a presentation in the leading theatre (in Esperanto), of "Natan la Saĝulo," a vocal concert, and a fancy dress ball.

Some very practical questions were considered by the Congress. It was decided to request the national societies which had become united under the K. R. scheme, to compile official statistics, showing the number of groups and total number of members, and information under the headings, "Esperanto and Schools," and "Esperanto and Commerce," and also to compile a list of Esperanto publications from the year 1887. The Congress also expressed the desire that during future Congresses the agenda for the full Congress should include speeches by expert and eloquent Esperantists, on themes of world-wide importance and interest, which would provide subjects for discussion and debate.

There were 44 subsidiary specialist congresses; so it is impossible to name them all, much less so to outline the work they did.

Included in the week's activities

were a pilgrimage to the Albrecht Durer Monument, Church services (Protestant, Roman Catholic, Hebrew, Bahaists), a Freemasons' Convention, visits to municipal institutions, excursion to Schmausenbuck, visits to factories, picture theatres, and to the show places of the city. It would appear that the week was about as crowded with good things as was possible. The Congress was in all respects as great a success as any of its forerunners, and practical steps seem to have been taken to make future Congresses even more successful. Apart from the specialist sub-congresses, one does not look for results from the main Congress, other than the meeting together of Esperantists from different countries, thus fanning their enthusiasm and placing before the world the annual object lesson of the fitness of Esperanto for congresses attended by members speaking different languages, and the broadening influence resulting from the interchange of ideas between people from every corner of the world.

The consideration of the matters dealt with during the XVth Congress at Nurnberg, and working towards giving effect to them, will keep Esperantists busy until called upon to assemble next year at the chosen locale of the XVIth Congress.

(We are indebted to s-ro. George Gordon for the daily issues of "Esperanto Triumfonta," which he posted to us, day by day, from Nurnberg, during the sittings of the Congress, and to the journal named, from which we have extracted the foregoing.—Ed.

ESPERANTISTA AKADEMIO.

PRI LA LANDNOMOJ.

Antaŭ nelonge la Esperantista Akademio voĉdonis pri la formo de la landnomoj, kun preskaŭ unuanima rezulto, laŭ kiu la uzo de la finiĝo io eĉ kiel elekta, permesebla apud ujo ne estas konsilata.

Nun estas presita en "kolekto de la Akademio," "Vortaro de Oficialaj radikoj de Esperanto," kun listo de ĉefaj landnomoj (regnanoj). Ni redonas tiun liston.

Post la nomita listo sekvas jena roto: "La finaĵo io (ne sufikso) kiam internacia en landnomo ne estas kon-

traŭfundamenta (Germanio apud Germanujo, kiel evolucio apud evoluo Fundamento sekcio 15) sed tamen ne konsilinda, ĉar tute senutila komplikaĵo."

Ĉefaj Landnomoj (regnanoj).—

Listo de la Akademio.

EŬROPO.

Aŭstrujo (aŭstro).—Neniu motivo nun por la formo Aŭstrio. Belgujo (belgo), Britujo (brito), Anglujo (anglo), Irlando (-ano), Skotlando (-ano), Bulgarujo (bulgaro), Ĉeĥoslovakujo (-slovak), Danujo (dano), Finnlando (-ano), Francujo (franco), Germanujo (germano), Bavarujo (bavaro), Prusujo (pruso), Saksujo (sakso), Grekujo (greko), Hispanujo (hispano), Holando, Nederlando (-ano), Hungarujo (hungaro), Italujo (italo), Jugoslavujo (-slavo) Norvegujo (norvego), Polujo (polo), Portugalujo (portugalo), Rumanujo (rumano), Rusujo (ruso), Svedujo (svedo), Svisujo (sviso), Turkujo (turko).

AZIO.

Ĉinujo (ĉino) aŭ Ĥinujo (ĥino), Hindujo (hindo), Japanujo (japano).

OCEANIO.

Aŭstralio (-ano), Nov-Zelando (-ano).

AMERIKO.

Kanado (-ano), Meksiko (-o, -io (-ano), Usono (-ano), Argentino (-ano), Bolivio (-ano), Brazilo (-o, -io (-ano), Ĉilio (-ano), Kolombio (-ano), Peruo (-ano), Urugvajo (-ano), Venezuelo (-ano).

AFRIKO.

Alĝerio (-ano), Egipto (-ano), Kaplando (-ano), Maroko (-ano), Tunizio (-ano).

MALFERMU LA PORDOJN DE LA LERNEJOJ!

(Pedagogia skizo post 15jara esp. instruado en lernejoj, de W. Hahn, GOHLIS, Dresden.)

—Kiu havas la ĝejnulojn, tiu havas la estontecon.—Tiu ĉi germana proverbo pruvis sian verecon ĉe la evoluo kaj efektivigo de multaj ideoj gravegaj por la homa kulturo. Ankaŭ rilate al la Esperanto—movado ĝi montras la solan vojon, kiu kondukas nin al la celo. Tion oni ĉiam sufiĉe konsideris, kaj valoraj propagandaj fortoj, uzitaj sur malĝusta laborkampoj, estas vane konsumitaj. Dum la lasta tempo eminentaj gesam-ideanoj sukcesplene laboris por la en-

konduko de Esperanto en la lernejojn, kaj la grava internacia konferenco okazinte dum la pasinta jaro en la palaco de la ligo de la nacioj en Genevo havis la saman celon.

Esperanto jam de kelkaj jaroj frapas la pordojn de la lernejoj. En multaj urboj kaj vilaĝoj oni permesis la eniron kaj instruadon, grandparte kiel laŭvola fako, parte ankaŭ jam devige.

Kiu penas, enkonduki Esperanton en la lernejojn, ĉiam devas aŭdi la samajn kontraŭdirojn: La lerneja instruaj planoj jam estas tro plenigitaj; novaj fakoj ne povas esti akceptataj, ĉar la ĝisnunaj estas necesegaj rilate al speco kaj amplekso. Ĉi tiu opinio estas certe prava. Oni postulas multon de la lernejoj kaj interne de la oficialaj fakoj kelkaj pedagogoj kaj nepedagogoj havas siajn apartajn dezirojn. Tial la fortoj de la infanoj estas tute okupataj. Kiel instruisto oni devas konsenti ĉi tiujn kontraŭdirojn kaj ankaŭ kiel Esperantisto oni ne povas nei ilian verecon. Ĉu oni nun devas konkludi: Sekve ĉiu nova fako, ekzemple Esperanto, devas esti rifuzata? Tiu ĉi konkludo estus prava, se Esperanto estus plipezigo, plimalfaciligado de la lerneja instruado.

Sed kiu havas tiurilatajn spertojn tiu scias, ke la Esperanta instruado en la lernejoj ne plipezigas, ne plimalfaciligas la instruon laboradon, sed ĝi apogas, helpas kaj plifaciligas la aliajn instruajn fakojn. Dum dek kvin jaroj mi ĉiam denove faras tiun ĉi sperton, ĉar mi instruas krom Esperanto ankaŭ la aliajn fakojn en la sama klaso. Batalante por la enkonduko de Esperanto,—ekzemple en gepatra kunveno,—mi povas pruviti tiun unue rilate al la gepatra lingvo, al kiu oni donas pro ĝia graveco la plej multan tempon kaj zorgon. Oni bone scias ke tre multaj ĝelernantoj forlasis la popolan lernejon post ok-jara lernado, pri kiuj oni ne povas diri: Ili perfekte scipovas la gepatran lingvon buŝe kaj skribe. La kaŭzo estas la gepatra lingvo mem. Ĝi es-

tas kun la multego da malregulaĵoj kaj arbitraĵoj tiel komplikita instruado, ke multaj eĉ post multjara penado ne povas uzi ĝin perfekte.

Jen Esperanto; ĝi povas helpi! Kompare kun la naĉiaj lingvoj esperanto estas tute logike konstruita kaj ne havas malregulaĵojn kaj esceptojn. Kvazaŭ en la spegulo de tiu ĉi logika fremdlingvo la infanoj ekkonas la propran gepatran lingvon. Gramatikaj malfacilaĵoj baldaŭ estas venkataj senpene. La lingva sento kreskas. La senco de multaj vortoj, metaforaj kaj alegoriaj esprimoj kaj frazoj estas pli klare komprenata de la infanoj, kaj per tio ili bone penetras en la spiriton de la gepatra lingvo kaj ekkonas ĝian belecon. Tial ĉiuj Esperantaj ĝelernantoj, kiuj ankaŭ instruis la gepatran lingvon, spertis, ke la Esperanta instruado multe apogas kaj helpas la plenan lernadon de la gepatra lingvo. Ankaŭ neesperantistaj kolegoj konstatis tre rimarkeblajn progresojn en la gepatra lingvo, depost la esperanta instruado.

Sed ankaŭ por la aliaj fakoj la helpo de Esperanto montriĝas. En la natursciencaj fakoj la fremdaj vortoj ne plu estas malfacilaj. La esperantaj infanoj povas traduki kaj klarigi ilin. La geografia instruado fariĝas vivoplena kaj efektiva, se la lernantoj alportas siajn bildojn, poŝtkartojn kaj leterojn, kiujn sendis la alilandoj ĝemikoj. Fiere ili komunikas al la klaso:—Mia esperanta amiko skribas al mi pri sia hejmlando tion kaj tion.—La instruisto ordigas kaj aldonas. Tia instruado ne plu estas teorio, tia instruado ne donas nur nebulan imagon pri fremda lando, kiu ne tre interesigas, ĉar oni certe ne povas vojaĝi tien,—ne, tio estas vero kaj vivo kaj memlaboro, ĉar inter la ĝelernantoj kaj la fremda lando kun ĝiaj loĝantoj ekzistas interrilatoj personaj kaj plej interesaj por la infanoj. Tial preparita kampo pli bone akceptas kaj enradikigas la semerojn dissematajn de la instruisto, kaj ankaŭ la laboro de la memoro estas plifaciligata.

Daŭrigota.

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn, ĈOKOLADOJN PER POŝTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3s. (aldonu 6p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokoladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

DU HUNDOJ KAJ PALISARO.

de Henry Lawson.

Nenio pli multe frenezigas hundon kiam li ne povas eliri—diris Mitchel—ol kiam alia hundo venas al la ekstero de lia palisaro, enflaretas, kaj bojas kontraŭ li tra la fendoj. Eble la alia hundo estas tute nekonatulo; eble li estas malnova kunulo, kaj ne bojas—nur enflaretas—sed tio estas tute egala al la hundo ĉe la interno. La interna hundo ordinare komencas la malpacadon. Tiam la ekstera hundo fariĝas kolera, freneza, nur pro tio, ke la interna hundo kolerigas, frenezigas kaj faras tion da senenca malkvieto tute pri nenio; kaj tiam la ekstera hundo bojas siavice kaj igas la malpacan miloble pli brua, kaj la interna hundo ŝaŭmas ĉe la buŝo, disjetegadas ŝaŭmon, kaj faras tion da bruego, kion povus fari miliono da ŝtalaj kaptiloj.

Mi ne scias kial la interna hundo fariĝas tiel freneza pri la afero; eble li ekpensas ke la ekstera hundo trovas lin en malbona situacio kaj tial agas kontraŭ li malestime; sed kia ajn estas la kialo, ju pli longe la malpaco daŭras des pli freneza li fariĝas; fine li fariĝas tiel freneza, ke li estas preskaŭ preta ekformordi sian propran voston kaj ĝin disŝiri, pro tio, ke li ne povas eliri kaj dispecigi la alian hundon; se li ja elirus li nepre mortigus la alian hundon, aŭ penegi tiel fari, ĉe se tiu estus sia propra frato.

Iafoje la ekstera hundo nur ridetas kaj trovas for. Iafoje li afable redonas bojon; iafoje li ellasas neatente duon da bojoj por esprimi ke, kvankam la afero estas seninteresa por li, li sentas, ke li devas diri ion; ĉar tio estas atendata pro lia digno kaj hundeeco en la cirkonstancoj; iafoje la ekstera hundo, se li estas malgranda hundo, eksaltas for de la palisaro ĉe la neatendata surprizo, aŭ, se li estas malrespektema hundo, unue li sin certigas, ke la interna hundo ne povas eliri, kaj tiam li ricevas iom da amuzo.

Estas amuze vidi grandan hundon de la novlanda raso kun larĝa bonkora rideo sur sia vizaĝo, enflarantan ekster palisaro la tutan tempon, dum la interna hundo bruegas po tridek bojetoj en ĉiu sekundo, kovradas sian buŝon per ŝaŭmo, disjetadas ĝin tra la fendoj, kaj furioze streĉadas kaj sknadas ĉiun artikon en sia korpo ĝis la lasta artikolo en sia vosto.

Iafoje la interna hundo estas malgranda hundo, kaj ju pli malgranda li estas des pli li bruegas ĉar li tre scias ke li estas sendanĝera. Kelkafoje okazas, kiel mi antaŭe diris, ke la ekstera hundo estas kolerema hundo, kiu malamas malpacadon, kaj neniam volas havi malkonsenton kun iu ajn—tute simile al multaj pacemaj homoj, kiuj malamas malpacojn, kaj ĉiam estas afablaj, ĝentilaj, laŭ maniero malagrabla kaj moka kvankam ĝentila, kiu dezirigas vin forfrapi al ili la kapojn de la ŝultroj; homoj kiuj neniam komencas malpacon sed daŭrigas ĝin, faras ĝin miloble plimalbona, kaj nur tial, ke ili ne komencis ĝin—homoj kiuj diradas, ke ili ne komencis ĝin sed iu alia. La kolorema ekstera hundo kiu furiozas kontraŭ la alia hundo pro tio, ke ĉi tiu koleriĝis, diras:

—Kial vi faras tian bruegon? Kio estas al vi, He?—Kaj la interna hundo diras:

—Al kiu, vi pensas, ke vi parolas? Vi malbelega— Mi— kaj tiel plu. Tiam la ekstera hundo diras:

—Vi sencerbulo! Vi estas pli malbona ol malpacema maljuna hundino!

Tiam la bruego plifortiĝas oni povas ĝin aŭdi de kelkaj mejloj; ĝi estas ĝuste simila al Ĉina milito.—simila al cent pafilegoj pafantaj po okdek senkuglaj kartoĉoj en ĉiu momento, kaj la ekstera hundo iĝas tiel same avida eniri por elmanĝi la internan hundon, kiel la interna hundo eliri por seninternajigi tinn. Tamen se du hundoj antaŭe okaze sin renkontus ekster la palisaro eble ili afable interparolus, fariĝus bonegaj amikoj, ĵurus eternan kunulecon, kaj sin akompanus

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET

— PRAHRAN —

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

hejmen!—(El "While the Billy Boils"—Tradukis George Gordon, "Gego.")

(Presigita laŭ la afabla permeso de la posedantoj de la aŭtorrajtoj, Angus & Robertson Ltd., 89 strato Castle-reagh, Sidnejo.)

SOVAG 'AJ BIRDOJ ELKOVAS. KOKIDOJN.

Strangan scigon oni ricevis el Hay, kiu estas urbo en Nova Sud-Kimrujo. Samuel Proctor, lima zorganto ĉe Gre Gre ranĉo, rakontas la jenan aferon, kaj la posedanto de la ranĉo atestas la verecon de la rakonto.

Pro tio ke li ne povis havigi al si koreman kokinon, Proctor pensis, ke estus bone utiligi kiel kovilojn la sovaĝajn, indigenajn birdojn, kiuj tre okupadiĝas nuntempe pri la nestoj. Li elserĉis la neston de korniko, en kiu sin trovis kelkaj nove metitaj ovoj.

Li kolorigis 3 ovojn de kortbirdino malklare verdaj, por ke ili simulu la ovojn de korniko, elprenis la ovojn de la korniko kaj anstataŭis tiujn de la kortbirdino. Tiel li agis ankaŭ ĉe nesto de akcipitro.

Kiam estis tempo por la elkoviĝo de la kokidoj, li trovis 3 kortbirdetojn en la nesto de la korniko.

Proctor diris, ke de tiam li spertis egalan sukceson ĉe aliaj nestoj, kaj jam li estas kulturanta 11 kortbirdetojn, kiujn elkovis kelkaj kornikoj.

Nur unu kokidon elkovis la akcipitro el tri ovoj. Proctor opinias, ke la kialo estas por tio ke la nesto ne estis varme remburita.

Nuntempe Proctor havas 50 ovojn dismetitaj inter kelkaj nestoj de kornikoj. (F.M.H.)

S-ro. Percy Hudson parolis pri Esperanto al la Malverna Klubo por Knabinoj, (Malvern Girls' Club), la 13an de septembro. La kvindek ĉeestantoj aŭskultis tre atente kaj du el ili aniĝis al la Esperanta rondo. Ĉiu promesis fabriki po unu veston por sendi al la suferintoj de la Japana terskuego.

RECENZOJ.

Idoj de Orfeo, de H. J. Bulthuis (L.K.). Mendebla ĉe Centra Esperanto-Librejo, 's-Gravenhage, Nederlando.

Estas ja nur malofte, ke la Esperantistaro havas la okazon legi tiel grandan originalan verkon, kiel estas la, "Idoj de Orfeo." En la amplekso de 540 paĝoj la vivhistorioj de la tri ĉefaj personoj estas tutplene rakontitaj de la infanaĝo ĝis frua vireco. Pro la fakto ke la verko priskribas la travivaĵojn de tri knaboj, kiujn stranga sorto metas sub la zorgo de personoj tute fremdaj al ili, kaj, ke la rezultato devas esti la sama—ĉiu devas fariĝi majstra muzikisto—estas unuto-neco de temo. Spite de la scio ke ĉio finiĝos bone la intereso de la leganto estas bone streĉita ĝis la lasta paĝo. La priskribo de la kariero de la unue prezentita knabo, Jafet, estas eble la plej bona parto de la romano. La skizo de lia vivo sur malgranda insulo, en kuneŝto nur kun liaj (kiel li pensis), gepatroj, hundo, kato, kaprino kaj papago alportas rememorojn de libro tre amata de tiuj, kiuj legis ĝin dum la infanjaroj. Tiu libro—Robinson Crusoe—estis unu el la du libroj sur la insulo, kaj sendube nia aŭtoro lokiĝis ĝin tie ĉar ĝi estis de li tre ŝatata. La klara simplaĵo de la stilo tre similas tiun de la verkinto de "Robinson Crusoe." Ke tiuj komparoj sin prezentas al angla leganto estas pruvo de la ĉarmhavaj allogoj de la nuna verko. Nenecese estas malkaŝi la temon. Ĉiu, kiu komencas legi la libron, faros tion por si mem, ĉar certe estas, ke ĉiu, kiu komencas legi ĝin interesiĝos ĝis la fino.

Inter la plenaj priskriboj, vere koraŭtanta estas tiu de Rika, la surdmultino. Ĝi metas antaŭ la okuloj la plorindan animstaton de tiaj malfeliĉuloj kaj vekas en la koro senton de kompato por la suferantoj. Bona ankaŭ estas la priskribo de la hundosimila fideleco de Ivan, la gibhava markniristo, al Johano, la magia bon-

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

faranto al ĉiu ajn. La verko estas plena de mallongaj priskriboj, kiuj vidigas la personojn tiel klare kaj trafe, kiel vinjetoj. Ke multaj el ili estas evidente enmetitaj nur por pligrandigi la libron neniel senvalorigas ilin.

En neniu antaŭa romano estis Esperanto tiel nature enkondukita kiel ĉitie, kaj kvankam la leganto kiu povas legi ĝis tiu punkto estas persono kiu ne bezonas esti konvertita al Esperantismo, oni ne povas ne vibri je plezuro, ke nia lingvo ekzistas por plenigi ĝis la rando la pokalon de feliĉo de la tri "Idoj de Orfeo."

Ĉi tie ne estos kritiko de la gramatiko. Ĉiu konsentas ke Macaulay havis bonan, plaĉan stilon en la Angla lingvo, sed iufoje severa gramatikisto substrekiis eraron en sia ekzemplero, sur preskaŭ ĉiu paĝo. Sed oni ankoraŭ legas la verkojn de Macaulay kaj ĝuas ilin.

Oni ne devas pensi, ke multaj gramatikaj eraroj sin trovas en la nuna verko. Fakte nur kelkaj vidigis, kaj en libro de tia granda oni ĉiam atendos vidi iujn. La stilo de la aŭtoro estas malsimila al tiu de Meyer, de Vallienne, de Luyken, sed, tamen, ĝi estas plaĉa, fluanta kaj, super ĉio, facile komprenebla.

S-ro. Bulthuis skribis romanon, kiu sendube alportos ĝuon al miloj de Esperantistoj kaj metis en iliajn manojn unu planan refuton de la ofta aserto ke Esperanto havas nenian literaturon. —(C. W. B.)

"La Lulilo." teatraĵo en kvar aktoj de D-ro. Alois Ausserer, Esperantigis, D-ro. Franz Christanell. Eldonisto V. Hopling, Munchen.

(Ĉiu recenzata libro estas mendebla, ĉe A. E. A., Melbourne.)

AGRABLA AVIZO.

Ni ĝojas, ke la poŝtoŝeĉejo nun akceptos ĉi tiun gazeton, kiel novaĵjurnalon. Pro tio, ke la poŝtpago por la gazete estonte estos malaltigita, la eldonistoj esperas, ke abonantoj (se ili ne kutime bindigas siajn ekzemplerojn), sendos ilin aŭ al fremdlanduloj aŭ al lokaj neabonantoj, por disvastigi nian aferon kaj eble allogi la ricevintojn fariĝi abonantoj.

KELKAJ SUGESTIOJ POR PROPAGANDO.

Membroj de la Sidneja Esperanto-Societo, kiuj ĉeestis la kunvenon je la 20a Septembro, ĝuis tre informan lecion de s-ro. F. T. Simon pri la ĉiam absorbla temo "Propagando."

La prezidanto de la societo, post la parolado, diris, ke oni malofte aŭdis tiel interesan kaj instruplenan esperantan lecion kiel la ĵus faritan kaj plezure proponis, ke raporto estu sendota al "La Suda Kruceto," por ke esperantistoj ekster Sidnejo profitu per la valoraj sugestioj de s-ro. Simon. La propono estis aklame akceptita.

Komence la paroladanto klarigis la diversajn metodojn de propagando, nome personan, ĝeneralan kaj publikan kaj tiam pritrakis ilin laŭvice. La plej gravaj punktoj, s-ro. Simon diris, estas: Bone scii tion pri kio vi parolas aŭ skribas. Se vi iom dubas estas preferinde silenti. Oni riskas tro multe per konjektado. Due, neniam troigu! Per troigo oni perdas pli ol oni gajnas. Ni havas en nia movado tiel multe priparoli, ke troigo estas tute necesa.

Akiri propagandajn temojn estas tre facila afero, nur necesas legi bonan esperantan gazeton, memori okazajn kaj rediri ilin. Legu ĝin (aŭ ilin) en trajnoj, tramoj, oficejoj kaj ĉe via laboro; ĝi ne nur pliperfektigos vin mem, sed atentigos aliajn pri nia afero. Parolu en konvena maniero, sen tro da fervoro kaj ne lacigu aŭ plenplenigu la aŭdantaron.

Kutima demando estas "Ĉu Esperanto faras ian progreson nun?" Por Aŭstralianoj le respondo estos pli interesa se oni donos ekzemplojn fariĝintajn de Aŭstralianoj eksterlanden, ekzemple s-roj. Maurice Hyde, Percy Hudson, George Gordon, J. G. Pyke, Roy Rawson, kaj nun W. J. Drummond.

Tiam oni povas diri pri lernejoj. Memoru, kiam vi detalas la landojn, precipe nomi la lernejojn en Anglujo kaj Skotlando, ĉar Angloj pli interesas en ili ol en fremdlandaj. Portu la raporton de la Ligo de Nacioj en kiu troviĝas kompleta historio kaj statistiko.

Alia konvinka argumento estas la raporto de la Internacia Komercia Konferenco en Venezio. Lasu komercistojn legi ĝin private kaj proponu traduki por ili korespondadojn aŭ meti ilin en rilatojn kun aliaj komer-

cistoj. U. E. A. Delegitoj povas doni valoran helpon.

Se demandanto serĉas informon pri religio, ne priidu la aferon, eble vi ofendos lin. Ni ĉiuj ne pensas same kaj kio estas agrabla al vi, povas esti tre malagrabla al alia persono. Eĉ se personoj uzas Esperanton por disvastigi religion estu tolerema kaj ĝnu, ke ili uzas Esperanton.

Rilate al ĝenerala propagando S-ro. Simon diris—Nia movado en Aŭstralio estas rimarkinde malgranda proporcio. Kial? Ĉar ni ne interesas influajn personojn. Per tio mi ne intencas sugestii, ke la gubernatoro aŭ la ĉefurbestro devus esti Esperantistoj. Tute ne! Influaĵ homoj estas: instruistoj, komercistoj kaj redaktoroj.

—Publika parolado estas grava flanko de propagando. Oni elektu nur bonaĵn paroladistojn kaj ne personojn kiuj nerviĝas, koloriĝas, parolas neklare, aŭ en kiuj ni. Kiel Esperantistoj, ne havas kompletan konfidon. La parolado ne estu nura seka raportado pri niaj sukcesoj: rakontu iom el la historio de Esperanto. Ĝi havas honoran devenon. Aldonu ankaŭ pri propraj spertoj: korespondado, interŝanĝado, legado, voĉo, k.t.p., kaj ne forgesu anonci la adreson de la plej proksima grupo, aŭ disdoni foliojn kun tiu adreso.

—Finfine, ĉiam portu la verdan stelon, ĉiam parolu Esperante ĉe publiko kiam vi estas kun alia Esperantisto. Ne timu erarojn, la neesperantistoj ne rimarkos ilin! Ĉiam memoru, ke Esperanto estas ordinara, praktika, proza, ĉiutaga, funkcia afero. Parolu nature pri ĝi kaj ne en terminoj de projekto, resaniganto de ĉiuj eblaj malfeliĉoj de la mondo, nova religio aŭ miraklo. Ĝi ne estas tio, ĝe estis konstatita de plej alta aŭtoritato kiel "Vivanta Lingvo."

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K. — The Sydney Municipal Library (Sidneja Urba Biblioteko), mendis 55 novaĵn librojn por ĝia Esperanta sekcio. La sortimento konsistas el romanoj, noveloj, dramoj, instruaj kaj teknikaj libroj, sub eksterbaro de lernolibroj de kiuj la biblioteko jam posedas sufiĉajn, kaj montros al la publiko la stadion kion Esperanto atingis en literatura mondo.

En West Marrickville publika lernejo propaganda parolado okazis je 29 aŭgusto, sub aŭspicioj de Parents' and Citizens' Association (Gepatra kaj Civitana Asocio). S-ro F. V. Taylor, parolis pri Esperanto en lernejoj s-ro L. E. Pfahl pri Esperanta progreso komerce kaj s-ro G. H. Chappel klarigis la senton de nia afero. Ĉirkaŭ 40 personoj ĉeestis kaj postaj demandoj pruvis la vekigitan intereson.

Ĉiusemajnaj prelegoj kaj muzikaĵoj daŭrigas ĉe Sidneja Esperanto-Societo. S-ro, L. E. Pfahl, en lekcio pri "Esperanto en praktiko" je 27 septembro, donis multajn bonegajn ekzemplojn de praktika uzado de Esperanto en diversaj partoj de la mondo. Li tre konvinke prezentis la temon kaj oni esperas, ke li same sukcesos ĉe komercistoj. La societo iras tre bone kaj oni jam rimarkas plibonigon en la parolado de membroj.

LINGVA KOMITATO.

Laŭ la decido de la Lingva Komitato la formoj: analog', konfidenc', nekrolog', budĝet', estas aprobitaj kiel oficialaj formoj (kontraŭ la formoj: analogi', konfidenci', nekrologi', buĝet' aŭ budĝet', budjet').—Plimulto de la L. K. ankaŭ preferas: Jezu' (kontraŭ Jesu') kaj ark' (kontraŭ arĥ'), sed pro la nesufiĉeco de la plimulto en "Oficiala Radikaro" ambaŭ 2 formoj ankoraŭ restas (kaj plie: Jesuito apud Jezuito). La ĝenerala uzado decidis.

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro, E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

NEKROLOGO.

Kolonelo John Pollen, la mondkonata pioniro kaj propagandisto de Esperanto, mistere malaperis en la insulo Manx, en la vespero de la 18a de junio. De tiam nenio sciigis pri li ĝis la 22a de julio, kiam lia korpo troviĝis ĉe Auchencraig, malgranda vilaĝo sur la sudokcidenta bordo de Skotlando. Oni povas supozi, ke nia amata samideano promenante apud la maro, akcidente enfalis, dronis kaj forportiĝis. Tiel forpasis unu el la plej ĉarmaj homoj kiuj iam vivis. Al lia tuta parencaĵo ni etendas nian tutkoran simpatian. — (El "British Esperantist.")

GAZETOJ RICEVITAJ.

La Lumturo, 2-semajna peresperanta politika gazeto tutmonda por la intereso de homoj, 60 Langenstr. Bremen, n-ro. 1. **Esperantio**, ilustrita aperas duonmonate, Fach 18 Charlottenburg, Germanujo, n-ro. 1.

Belga Esperantisto, maj-jun.; **Esperanto Triumfonta**, n-roj 147, 148, 149, 150, 153; **Espero Teosofia**, maj-aŭg.; **Export Esperantist**, apr.-maj.; **Int. Medicina Revuo**, n-ro. 4;

Oni povas mendi tole binditan jar-kolekton de "La Suda Kruc" el la dua kaj tria jaroj. Prezo 58. Leterkesto 1367, P.O. strato Elizabeth, Melbourne.

"Lanuna adreso de **S-ro S. Polotynski** (la Pola muzikisto kaj ĵurnalist) estas: 74 Georges Riv. Rd., Croydon (Sydney), Aŭstralio."

FILIIĜITAJ GRUPOJ.

Australazia Esperanto-Asocio. Prezidanto, S-ro. A. R. Cohen. Sekretario, S-ro. G. Redfern. Poŝta adreso Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejoj, (Melburna sekcio), Hardware Club Chambers, 350

Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick Esperanta Grupo. Renkontejoj kaj poŝta adreso ĉe F-ino. P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Dargaville Esperanto Society. — Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O., Dargaville, N.Z. Renkontejoj, la legosalono de S-ro. A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo, renkontejoj Eaton Bray lernejo Davey St., ĉiun duan mardon 7-30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sekretaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

Iru Antauen Grupo. Prezidantino S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Renkontejoj 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

La Carnegie Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Renkontejoj kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl St., Murrumbidgee. (du pordoj de la Carnegie Cinemteatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Nigra Cigno Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Renkontejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale. Prezidanto S-ro. H. Byatt, Sekretariino, F-ino. I. Thomas. Renkontejoj kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. — Prezidanto, S-ro. D. Tilly. Sekretario, S-ro. Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro. Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Renkontejoj, La domo de S-ro. Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 39 Elizabeth Street, Melbourne.